

Jongeren Esperanto
Nieuws

Jen



E@I

voorstelling projecten

OpenOffice.org

baldaŭ en Esperanto

PostSomera KlaĉKunveno

dua informilo

Baltische Esperanto-Dagen

322 deelnemers uit 18 landen

Colofon / kolofono

Jongeren Esperanto Nieuws (JEN) is een informatieblad voor Nederlands-sprekende jongeren die belangstelling hebben voor de internationale taal Esperanto en voor taalproblemen in de wereld. Het is een gezamenlijke uitgave van de Nederlandse (NEJ) en Vlaamse (FLEJA) Esperantjongeren.

Het drukken en verzenden van de JEN wordt verzorgd door het *Esperanto-Centrum* te Antwerpen; de braille-versie wordt verzorgd door de Chr. Bibliotheek voor blinden en slechtzienden in Ermelo.

NEJ en FLEJA zijn de Nederlandse, resp. Vlaamse afdelingen van *TEJO*, *Tutmonda Esperantista Junulara Organizo*.

Een individueel lidmaatschap kost 20 EUR (tot 30 jaar). Giro 2717591 tnv ĉefdelegito de UEA in Rotterdam of giro 402-5510531-55 t.n.v. Flandra Esperanto-Ligo te Antwerpen met vermelding van *Individua membro MJ-T*.

TEJO-leden ontvangen een jaarboek, de bladen TEJO-tutmonde en Kontakto, plus kortingen bij bijeenkomsten.

Naast bijdragen van medewerkers, zijn de artikels in deze JEN onder andere gebaseerd op berichten uit e-maillijsten (nejkajfleja, Esperanto en Belgio,...).

De uiterste datum voor het binnensturen van artikels voor JEN 172 is 15 maart 2008

Vlaanderen (Int. toegangscode +32)

Redactie/Redakcio:

Yves Nevelsteen, Koning Albertlaan 147, 9000 Gent. Tel. 09/3307156
yves.nevelsteen@gmail.com

Administratie en informatie / Administrado kaj informado: FEL, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen.

Abonnementen en lidmaatschap

- Introductieabonnement (drie nummers) gratis
- Lidmaatschap FLEJA/FEL: 25 EUR (Omvat de tijdschriften Horizontaal en JEN)
- Abonnement op JEN: 9 EUR
- Steunende leden die 30 EUR of meer bijdragen, ontvangen ook JEN.

Argenta-rekening / Ĝirkonto:

979-6339610-83 t.a.v. de Vlaamse Esperanto Jongeren, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen.

FLEJA-bestuur / FLEJA-estraro:

- Heidi Goes (voorzitter/prezidantino) heidi.goes@gmail.com
- Yves Nevelsteen (vicevoorzitter/vicprezidanto) yves.nevelsteen@gmail.com
- Yannick Vercammen (secretaris/sekretario) yannickvercammen@telenet.be
- Matthias Humet (penningmeester / kasisto) matthias.humet@gmail.com
- Björn Claes (bestuurslid/estrarano) bjornclaes@belgacom.net
- Carsten Mischke (bestuurslid/estrarano) batalanto@yahoo.de

E-post en www / retpoŝto kaj ttt:

e-post: fleja@telenet.be
internet: <http://www.esperanto.be/jongeren>
<http://www.esperanto.be/junuloj>

Nederland (Int. toegangscode: +31)

Administratie en informatie / Administrado kaj informado: Fabien van Mook, Sophoclesstraat 121, 3076 AL Rotterdam, Tel.: +31-10-2 91 71 51 fabien@galerio.org

Abonnementen en lidmaatschap

- Introductieabonnement Jen (1/2 jaar): gratis
Enkonduka abono Jen (duona jaro): senpage
- Lidmaatschap NEJ per jaar (incl. Jen):
Tot 20 jaar: 11,50 EUR / Vanaf 20 jaar: 14,50 EUR
- Abonnement op JEN: 9 EUR
- Donateurs die 14,50 EUR of meer bijdragen, ontvangen ook JEN.

Girorekening / Ĝirkonto:

719930 t.n.v. Nederlanda Esperanto-Junularo, Amsterdam.

NEJ-bestuur / Estraro de NEJ:

Op dit ogenblik is er geen actief bestuur in Nederland. Daarom verschijnt de JEN daar uitzonderlijk niet in gedrukte vorm. Er is wel een PDF-versie beschikbaar. Neem contact op met de redactie als je iemand kent die de "digitale JEN" wenst te ontvangen.

En tiu ĉi momento ne ekzistas aktiva estraro en Nederlando. Tial escepte tie JEN ne aperas en presita formo. Ja haveblas PDF-versio. Kontakto la redakcion se vi konas iun al kiu ni sendu "ciferecan JEN".

E-post en www / retpoŝto kaj ttt:

e-post: info@esperanto-jongeren.nl
internet: <http://www.esperanto-jongeren.nl>
mobiel / poŝtelefono: Tel.: 06-42507502

Provglegis Heidi Goes

Voorwoord

Omdat de bijeenkomsten UK en IJK dit jaar plaatsvonden in het Oosten, waren vooral de Senprograma Renkontiĝo in Catalonië, Someraj Esperanto-Studoj in Slowakije en Baltiaj Esperanto-Tagoj in Litouwen voor jongeren interessante alternatieven. Over de eerste twee kan je een verslag beluisteren op de podcast van de Poolse club Varsovia Vento (<http://www.viavento.org>), over de laatste kan je het artikel in deze JEN doornemen.

Ikzelf heb me deze zomer vooral beziggehouden met internet-projecten. Wist jij dat Lernu.net een project is van E@I? Lees meer over een aantal projecten van deze vereniging die op stapel staan op pagina 12 en 13.

Ken je nog maar een beetje Esperanto en/of heb je nog nooit deelgenomen aan een bijeenkomst? De najaarsbijeenkomst PSKK is in dat geval ideaal. Vorig jaar waren er meer dan 60 deelnemers uit 7 landen. We plannen een cursus voor beginners en gevorderden. Het theater zal fantastisch zijn. Van harte welkom!

Yves

Inhoud Enhavo

Voorwoord	3
Kio mankus al vi?	4-5-6
Ekzameno pri Esperanto	7
OpenOffice.org en Esperanto	8-9
Lingvolanĉilo	10
Baltische Esperantodagen	11
E@I	12-13
Cultuurmarkt Antwerpen	14
La milito de la ĉapeloj	15-17
Ekspozicio de E-bildkartoj	18
PSI-raporto	19
Renkontiĝo PSKK—dua informilo	20-22
Etymologie	23
Activiteitenkalender	24

Kio mankus al vi?

“Rakontu pri viaj mankejoj!” – jen kion mi petis al la esperantistaro dum la lastaj semajnoj. Kial mi subite ekinteresiĝis pri tiaj aferoj? Nu, mi studas kulturpedagogion ĉe la Fachhochschule Niederrhein en Mönchengladbach, Germanio. Je la fino de la lasta semestro ni realigu projekton engrupe. Ĉu en iu ajn grupo? Jes, ĝuste tial mi demandis min ĉu mi eble povas profiti el la reto Esperanta kiu kaptas tiom da viktimoj diversnaciaj...?

Nia tutsemestra temo estis “Leerstellen/Lehrstellen”. Tio estas vortludeto pro la malsimila signifo de tiuj du vortoj samprononcitaj en la germana: *Stelle* ambaŭkaze estas *loko*; sed *Leer* signifas *malplena*, t.e. ajna vakanta/neokupita ejo; *lehr* ĉiam rilatas al ajna instruado (ambaŭflanke! Oni povas instrui aŭ esti instruata, ekz. lernante iun metion oni okupas t.n. *Lehrstelle*). Pro la ĉieaj loĝlokoj de la esperantistaro mi tuj pensis pri skribprojekto, kiu bone realigeblas de antaŭ la propra skribtabolo, sen la nepra devo persone ĉeesti kaj klarigi la aferon al grupo da partoprenantoj. Ĉiuj skribu kelkajn liniojn. Pri kio? Pri loko kiu plenigendas/is/os en la propra vivo! Jes! Ekzemple pri valorega persono, pri muzikilo, kiu ĉiam akompanas iun, pri hobia ŝteletanta onian libertempon. Pri iu (aŭ io) kiu (kio) ŝanĝis ies

agadon, konduton, vivon. Kio mankus... Tio ankaŭ povas esti sperto kiu lernigis ion, eble eksterlandaj studado aŭ laborado, iu misdecido... La ĉefa demando “Kio mankus?” ja ĉiam samis, la respondoj kompreneble ne. Mi ne serĉis iujn eksterordinarajn personojn kun nekutimaj hobiaj, travivaĵoj, spertoj, laborkampoj (kvankam ankaŭ ili kompreneble estis bonvenaj!), sed rakontoj el la ĉiutaga vivo. Tiu demando eble estas iom stranga, unuavide, kaj laŭ ies opinio sufiĉe persona, certe malfacila, sed post iom da cerbumado respondebla por ĉiuj. Koncizas la demando, vastas la respondebloj. Kaj ĝuste tion pruvis la kontribuaĵoj kiujn mi ricevis! Jen la temo kaj ideo, jen kie mi ekis.

Ĉerande mi nun klarigu kiel mi sukcesis kapti volontulojn. Tion mi unue provis vid-al-vide dum la pasinta IS en Wewelsburg. Sed vi jam povas imagi, ke neniu tien iras por pripensi sian vivon, la plejmulto – kia surprizo – preferas la festadon. Krome bezonatas iom da tempo antaŭ ol oni kapablas surpaperigi siajn (profundajn) pensojn. La demando ne tuj trakteblas, almenaŭ ne serioze. Tial mi bedaŭrinde ne trovis tro da homoj, kiuj laŭdinte la ideon ankaŭ ekverkis.

Kiam mi revenis universitaten post la ferioj, mia profesoro

Kio mankus al vi?

tamen aprobadis mian
entreprenon kaj kuraĝigis min
daŭrigi. Mi do alparolis kelkajn
kiuj estas benataj per sia aneco al
mia konataro. Foje eĉ okazis ke ili
sukcese laborigis siajn
samklubanojn. Sed finfine venis
la tempo por plano B, nome
kolekti kiel eble plej multajn
kontribuaĵojn per reta alvoko. Mi
devas konfesi, ke tio estis eta
sinvenkado: sendi mian alvokon
al nekonatoj kaj tiel malŝatetigi
min tutmonde per nura peteto.

Bonŝance mi kuraĝis! Per la
yahoo-listo de la skajpanoj mi
laborigis la mondon. Kial mi
elektis ĝuste tiun ĉi? Ĉar ĝi estas
legata de sufiĉe da Esperantistoj.
Ĝia legantaro konsistas el homoj
kiuj interesiĝas pri reta
komunikado. Krome ĝi estas ne
nur unulanda, male, ĝi estas
tutmonde abonata. Rapide
montriĝis, ke mia elekto ne
gravis... ĉar la helpemaj listanoj
tuj informis aliajn pri mia alvoko.

Estis kvazaŭ neĝbula efekto: Mi
metis mian peton en iun liston kaj
ĝi poste senkontrole disvastiĝis.

Foje mi miris, kiel homoj ekscii
pri mia projekto, foje pri la
reagoj - sed pleje pri la bonega
rezulto: Post du monatoj mi povis
kalkuli pli ol 70 kontribuaĵojn el
ĉirkaŭ 30 landoj, verkitaj en 20
lingvoj. Multe pli ol mi antaŭe
imagis! El preskaŭ ĉiu monda
angulo mi ricevis respondojn.
Ankaŭ mirigis min la aĝo de miaj
helpantoj: La plej juna havis nur
16 jarojn, la plej maljuna jam
80. Tiom pri la statistiko. Mi ne
kalkulis kiom ofte enŝteliĝis la
magia vorteto *Esperanto* - ja
estis projekto *per* kaj ne *pri*
Esperanto. Tamen ĝi neeviteble
atentigos la profesorajn kaj
studentajn legantojn pri nia
lingvo.

Mi ne jam emfazis la lingvan
aspekton. Tion mi faru ĉiloke: Mi
petis ĉiujn verki dulingve, unue



Kio mankus al vi?

en la gepatra lingvo kaj poste Esperantigi ĉion, por ke ankaŭ mi komprenu la enhavon. Plia mia deziro estis ricevi kiel eble plej multe da manskribitaj verkoj. Kial? Pro la aŭtentikeco. Manskribitaĵoj aspektas pli bele, la diversaj skribmanieroj (t.e. la skribsistemoj kaj la individua manskribo) pli forte impresas. Krome neniu povas aserti, ke mi mem ĉion elpensis kaj hejme kaŝentajpis. Oni do vidas, ke diversaj personoj estis envolvitaj en la verkon. Plia argumento koncernas la reprezentivecon de la tuta projekto.

Bonis la ideo kaj bone progresis la projekto... sed iel mi subtaksis la bumerangan moviĝon: Mi ĝojis pri ĉiu plia kontribuaĵo sed sammomente reportis min al la realo la devo germanigi ĉion... Mi ne povas nei ke la projekto, la tuta administrado, okupis min dum certa tempeto.

Kompense mi estis abunde dotata: ankaŭ per etaj aldonaĵoj al la sendaĵoj, jes, sed ĉefe per belegaj rakontoj. Mi eksciis pri la kafejo kiun juna usonano preskaŭ ĉiutage vizitas por renkonti amikojn, verki poemojn, ludi ŝakon, retumi aŭ ĝui sian plej ŝatatan trinkaĵon. Estas rakontoj pri la graveco de la muziko aŭ poezio. Ankaŭ la komputilo resp. la interreto ŝajnas esti nemalhavebla al iuj. Iuj sentas la malplenan lokon kiu ekestis pro transloĝiĝo, for de la

amikaro. Iu alia revas pri la granda arbo kiu staras en ŝia strato kaj ĉiam pensigas ŝin al agrabla promeno kun ŝia nepino. Mi lernis pri liberiga kaj religia movadoj en Latin-Ameriko, pri la iompostioma formorto de la katalunaj lingvo kaj kulturo, pri la senstreĉa vivo akorde al la naturo. Kaj pri la plezuro trajnenveturi laborejen, dum aŭtistoj malbenas plenŝtopitajn stratojn. Plia partoprenanto simple deziras diskotekon kiu enhavas ĉiujn forgesitajn ĉefverkojn de la muta kinarto. Jen okulfrapas, ke ĉiu havas sian mankejon.

Kion mi plie spertis? Certe oni permesis al mi enrigardon en aliajn kulturojn kaj landojn. Mi rajtis partopreni en universitata projekto de aliulo (kvazaŭ negoco interstudenta), ricevis "legant-leteron" kaj nun disponas pri novaj leteramikoj. Tradukante mi provis transgrimpi la lingvajn limojn de mia gepatra lingvo, t.e. la germana (se iu kapablas esprimi "geonkloj" per ununura germana vorto bonvolu turni sin al mi!) kaj terure ofte malkovris geografiajn mankejojn en mia kapo. Per tiu projekto mi sukcesis ŝtopi almenaŭ kelkajn el miaj truoj – dum samtempe aperis novaj. Sed tiujn mi traktos sola, ne plu kadre de iu universitata projekto.

Jessica Dehms

Ekzameno pri Esperanto

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) estas la ĉefa kolektiĝejo por instruistoj kaj edukistoj de Esperanto. Ĝi havas operaciajn rilatojn kun Unesko kaj estas aliĝinta faka asocio de Universala Esperanto-Asocio. ILEI havas sekciojn en pli ol 30 landoj kaj membrojn en pli ol 45.

En sabato la 13a de oktobro 2007 okazos en la Andreo Cseh-Domo (Riowstraat 172, 2585 HW Den Haag, Nederlando, telefono +31 70 3556677) sesio de la Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA en la niveloj elementa kaj meza.

La aliĝkotizo por loĝantoj en A-landoj laŭ la UEA-divido estas €35,00. La kotizo povas esti sendita al la konto 162626 nome de Internacia Esperanto Instituto kun la indiko 'Ekzamenoj' (IBAN NL04PSTB0000162626 - BIC PSTBNL21). La kotizo devas atingi la konton de la organizantoj plej malfrue la 30an de septembro 2007. Sen aliĝo de almenaŭ 7 kandidatoj, la ekzamenoj ne okazos. La 5an de oktobro estos sendataj konfirmiloj al ĉiuj aliĝintoj.

La Cseh-Domo estas atingebla de la Centra Stacidomo per la tramlinio 9 direkte al Scheveningen (1 zono). Akcepto kun kafo/teo je la 09:30. Komenco je la 10:00.

Informis:

Atilio ORELLANA ROJAS
Internacia Esperanto-Instituto
Riouwstraat 172
NL-2585 HW Den Haag
Nederlando
<iei001@tiscali.nl>



Por helpo dum la preparado por la ekzameno, flandroj povas kontakti Iwona Kocieba: <iwona.kocieba@telenet.be>, respondeculo pri ILEI en Flandrio.

OpenOffice.org en Esperanto

OpenOffice.org estas projekto kiu celas krei, per komuna agado, la plej eminentan internacian oficejan programaron, kiu funkcios per ĉiuj gravaj platformoj kaj donos aliron al ĉiuj funkcioj kaj datumoj per libera komponentbazita aplikprograma interfacoj kaj per XML-bazita dosierformato.

Antaŭ kelkaj jaroj Tim Morley lanĉis projekton por traduki OpenOffice.org al Esperanto. Malgraŭ pluraj lingvaj kaj teknikaj defioj, la interfacoj de OpenOffice.org (pli ol 58000 frazoj) intertempe estas tradukita.

De la 5-a ĝis la 8-a de julio en Cambridge, Anglio okazis renkontiĝo de tradukskipo de OpenOffice.org. Kelkaj aktivaj membroj de la skipo diskutis pri "dubindaj" tradukoj kaj malfacilaj terminoj kiel "dummy text" (lokokupa teksto), "wizard" (asistanto) kaj "to blink" (pulso). Konsilis de distanco, pere de labordosiero en Google Docs kaj per telefono, Bertilo Wennergren de la Akademio. La tradukskipo sendis dosierojn al

teknikisto de OpenOffice.org, kiu kompilis testversion. Malgraŭ tio ke preskaŭ ĉiuj interfacoj estas tradukitaj, en tiu ĉi unua testversio ankoraŭ aperis multe da netradukitaj menueroj. En Cambridge la skipo eltrovis ke la teknikisto kiu kompilis la testversion uzas pli novan version de certa programo. Oni sukcesis krei skripton kiu ĝisdatigos la traduklaboron. En la intertempe aperinta betaversio de OpenOffice.org en Esperanto ne plu aperas menueroj en la angla.

Momente (julio 2007) testversioj ankoraŭ ne enhavas ĉapelitajn literojn, interalie ĉar por aŭtomate anstataŭi dubindajn terminojn per interkonsentitaj alternativoj, la skipo uzas la programon Imacs, kiu ne bone subtenas Unikodon. Jam ekzistas skripto por krei ĉapelitajn literojn; en aŭtuno de 2007 devus aperi unua tutesperanta versio 2.3 de OpenOffice.org.

Restas la helptekstoj por traduki kaj necesas ekzemple ankoraŭ aldoni defaŭltan literumkontrolilon por Esperanto. La skipo





bonvenigas volontulojn, kiuj pretas kunlabori por kontroli, provlegi kaj poluri la pli firmajn testversiojn; se vi pretas helpi, kontaktu pri tio la tradukskipon. Kontaktoinformojn vi trovos en la retejo <http://eo.openoffice.org>.

Eble kelkaj legantoj rimarkis provizoran version kiu aŭtomate aperas en Linukso. Temas pri tre malnova laborodosiero de la traduksistemo Rosetta. La tradukskipo jam delonge ne plu uzas Rosetta, ĉar estas kelkaj malavantaĝoj de tiu ĉi sistemo. Vi ekzemple ne povas eltrovi kiu tradukis aŭ adaptis kion. En Subversion-deponejo, la sistemo

kiun la skipo momente uzas, ja ekzistas detala historio de ŝanĝoj. Ĉiuj ŝanĝoj estas aŭtomate senditaj per retroŝto al la dissendolisto de la skipo.

La tradukskipo inter si kaj kun diversaj fakuloj multe diskutis kaj plu diskutadas pri komputilaj terminoj kaj esprimoj. Por disponigi la konkludojn de tiuj ĉi diskutoj al pli granda rondo, ekestis la projekto Komputekeo (<http://www.komputekeo.net>). Ekzistas plano eldoni broŝureton kun ĉirkaŭ 5000 prikomputilaj terminoj kaj esprimoj, verŝajne en la somero de 2008.

Lingvolanĉilo

Lingvolanĉilo (angle: Springboard to Languages) estas projekto kaj laborgrupo en Britio, kiu celas uzi Esperanton kiel enkondukan rimedon por la lernado de fremdaj lingvoj. Ĝia oficiala celo ne estas instrui Esperanton, sed pere de ĝi konsciigi pri lingvolernado.

La 6-an de julio 2007 mi ĉeestis Esperanto-lecionon kadre de Lingvolanĉilo en Cambridge, Anglio. Infanoj al mi, kiel eksterlanda gasto, starigis kelkajn demandojn: "Kiel vi nomiĝas?", "Ĉu vi havas infanojn?" ktp. Ili devis plenigi formularon por montri ke ili komprenis pri kio temis.



Estis unika sperto por mi ĉeesti tiun ĉi pioniran projekton kaj konstati ke ĝi tre utilas kaj bone funkcias. Mi ekzemple diris ke mi nomiĝas "Ivo", kaj iuj infanoj tion literumis kiel "Evo". Miaj hejmbestoj, kobajoj, pro influo de la angla literumado, iĝis "kabijoj".

Por anglalingvaj infanoj estis tre utila ekzerco.

En Cambridge Tim Morley instruas en tri klasoj por infanoj ĉ. 9-jaraj. Regas entuziasmo, kaj inter la infanoj, kaj inter la instruistoj. En la klasoj pendas afiŝoj kun vortoj en Esperanto, samkiel en belgaj klasoj oni pendigas afiŝojn kun franclingvaj vortoj. Tiujn afiŝojn la infanoj kreas (kaj regule ŝanĝas) kun instruistino; ne esperantistoj disponigas ilin.

Momente (julio 2007) en du lernejoj oni instruas Esperanton al junaj infanoj. Plano estas ne nur daŭrigi en la venonta jaro, sed transdoni la instruadon de Esperanto al lokaj instruistoj por ke tiel ĉi liberiĝu tempo por povi startigi la instruadon de Esperanto en aliaj lernejoj.

La klaso en Cambridge korespondas kun klasoj en Benino, Germanio, Francio kaj Hungario. Organizantoj de la projekto intencas fari vojaĝon al unu el la klasoj en la somero de 2008. Kuniros tiam la gepatroj; estos bona okazo montri ankaŭ al ili pri kio temas Esperanto kaj kiel funkcias en praktiko.

Yves

www.springboard2languages.org

Baltische Esperantodagen

Van 14 tot 22 juli 2007 vond in Siauliai, in het noorden van Litouwen, de bijeenkomst Baltische Esperanto-Dagen (BET) plaats. Elk jaar wordt deze bijeenkomst georganiseerd in een andere Baltische staat. Met 322 deelnemers uit 18 landen was deze bijeenkomst de grootste in haar 43-jarige bestaan.

BET was uitzonderlijk goed georganiseerd. Zoals op de meeste Esperantobijeenkomsten was er een boekendienst en werden er voordrachten gegeven. Er waren excursies met bussen naar onder andere de "Kruisberg", een indrukwekkende plek met duizenden en duizenden kruisen.

Elke dag werd "La sagisto" uitgedeeld, een krantje met verslagen van de vorige dag en het programma van de dag zelf. Er was een zeer rijk cultureel programma en ook een primeur: de heruitgave van een vertaling van de trilogie van Tolkien werd er voorgesteld.

De organisatoren van het 43ste BET werkten nauw samen met de officiële instanties van Siauliai. Op

kosten van de toeristische dienst ontving elke deelnemer een gratis 64-pagina's tellende gids over de stad. Er was daarnaast een officiële ontvangst op het stadhuis met lekkere hapjes :-)

Ikzelf heb tijdens BET voordrachten gehouden en praktijksessies georganiseerd over de internetprojecten van E@I. De faculteit sociale wetenschappen stelde hiervoor gratis lokalen met moderne computers en internet-toegang ter beschikking. Tijdens een oefensessie met een vijftiental jongeren was zelfs de lokale televisie aanwezig. Ik was aangenaam verrast hoe modern het huidige Litouwen is en raad iedereen aan dit prachtige land eens te bezoeken.

Meer informatie over BET en de andere activiteiten van de Litouwse Esperantovereniging vindt u op www.esperanto.lt

De volgende Baltische Esperantodagen vinden plaats in Ventspils (Letland) van 5 tot 12 juli 2008.

Yves



**Baltiaj
Esperanto
Tagoj**

Van 11 tot en met 16 juli kwam in Kaunas (Litouwen) het team samen dat verantwoordelijk is voor de website www.lernu.net. Hierover verscheen een artikel in Libera Folio, <http://www.liberafolio.org/2007/lernukunsido>

In Kaunas vergaderde ook het bestuur van E@I (Esperanto@interreto of edukado@interreto), de vereniging die internetprojecten zoals Lernu.net uitwerkt en ondersteunt. Hoewel Lernu.net door de meeste jonge esperantisten in Vlaanderen en Nederland goed gekend is, zijn veel minder mensen op de hoogte van het bestaan van E@I en haar activiteiten.

In het volgende nummer van het tijdschrift *TEJO Tutmonde* verschijnt een uitgebreide beschrijving van een aantal projecten die E@I momenteel voorbereidt. Een kort overzicht.

Aktuale.info

Er wordt gewerkt aan een grote, professionele website die een overzicht geeft van de Esperanto-cultuur. Hierop zullen o.a. achtergrondinformatie, foto's, filmpjes en nieuws terug te vinden zijn. De inhoud van deze website zal regelmatig in het Esperanto worden bijgewerkt en daarna door lokale medewerkers in verschillende landen worden vertaald naar zoveel mogelijk

talen. Zo zal het mogelijk zijn om beginnende esperantisten, journalisten en andere geïnteresseerden een centrale plaats aan te bieden waar ze informatie kunnen terugvinden.

Reta universitato

Al te vaak gaat waardevol materiaal van voordrachten verloren. E@I wil dit materiaal bewaren en aanbieden op het internet, zowel in de vorm van teksten, cursusmateriaal als video's. Er zijn ook plannen om te werken met interactieve lessen en voordrachten via het internet.

Komputeko / Terminaro

Er loopt een project binnen E@I voor het verzamelen van computerwoorden en uitdrukkingen in het Esperanto en zoveel mogelijk andere talen: www.komputeko.net.

Komputeko

Onder andere de vertaalteams van OpenOffice.org, Firefox en KDE werken hieraan mee. De bedoeling is om dit project verder uit te bouwen, zodat het mogelijk wordt om de databank via het internet te bewerken. Bertilo Wennergren van de Esperanto-academie zal aan dit project meewerken, zowel op technisch als op inhoudelijk vlak. Er zijn plannen om ook termen van andere vakterreinen op deze manier te verzamelen en ter beschikking te stellen.

Bretaro

Dit project heeft als doel om informatie over Esperanto-literatuur en, in een latere fase, de literaire werken zelf, te verzamelen in een databank.

Gramatikkontrolilo

Spellingscontrole voor teksten in het Esperanto is al beschikbaar voor o.a. OpenOffice en UniRed. Onder leiding van de taalkundige (en esperantist) Eckhard Bick is er een ambitieus project gestart om ook grammaticaconrole mogelijk te maken. Het team kwam in augustus voor het eerst samen in Stockholm (Zweden). De uitwerking van het project start in november en de eerste resultaten zijn te verwachten omstreeks juni 2008.

Filmo "Esperanto estas..."

Een aantal professioneel gemaakte filmpjes over diverse aspecten van het Esperanto zijn al beschikbaar, o.a. op de dvd Esperanto Elektronike en op het internet. Tegen het einde van het jaar zou er een aparte dvd verschijnen.

E@I wordt financieel gesteund door Esperantic Studies Foundation (<http://www.esperantic.org>). Daarnaast dient de vereniging regelmatig projecten in bij verschillende Europese instanties. Meer informatie vindt u op de website <http://www.ikso.net>

Yves



Cultuurmarkt Antwerpen

De lokale Esperantogroep van Antwerpen, La Verda Stelo, was samen met een aantal vrijwilligers van de Vlaamse Esperanto-Bond en de Vlaamse Esperanto-Jongeren ook dit jaar opnieuw aanwezig op de Cultuurmarkt in Antwerpen.

Tijdens de informatiegesprekken met voorbijgangers werd vooral gepolst naar interesse voor de officiële avondcursus in de Quellinstraat die in oktober start. Overweldigend is de interesse nooit als het over Esperanto gaat, maar een aantal personen zei toch concreet van plan te zijn om naar de infoavond te komen.

Zoals gewoonlijk stond er naast

de stand met boeken en cursusmateriaal een bord opgesteld met een minicursusje. Vooral jongeren staan open voor deze plezierige kennismaking met de taal.

Ikzelf was alleen in de voormiddag aanwezig. Het blijkt niet altijd eenvoudig om vrijwilligers te vinden om op zondagochtend op een stand te komen staan. Mocht je zelf zin hebben om af en toe op beurzen mensen te informeren, neem dan gerust contact op met de Vlaamse Esperanto-Bond. Alle initiatieven om de internationale taal wat bekender te maken bij het grote publiek zijn steeds welkom.

Yves



La milito de la ĉapeloj

Foje reĝo rigardis sin en spegulo, kiel ĉiu-matene post la razado. Rimark-inte ion, kion li ĝis tiam neniam rimarkis, li sonor-igis al la ĉambelano*.

-- Via reĝa moŝto vokis min.

-- Jes, al-proksim-iĝu kaj staru apud mi antaŭ la spegulo.

La ĉambelano miris pro la ne-kutima ordono.

-- Sinjoro ĉambelano, ĉu vi rimarkas ion?

-- Kion mi rimarku? Via reĝa moŝto estas pli granda, pli bela, pli majesta, pli...

-- Tatata! Rigardu bone.

-- Mi rigardas.

-- Ĉu vi ne vidas, ke vi, simpla ĉambelano, havas sur la kapo la saman ĉapelon kiel mi?

-- Se via reĝa moŝto ordonos tion al mi, mi tuj deprenos mian ĉapelon, sed poste mi estos nur cambelano*.

-- Ne temas pri tio. Konservu vian simplan ĉapelon. Ĉu tamen ne decus, ke mia propra kapo estu pli lukse vestita ol via? Bonvolu venigi la prezid-anton de la Akademio.

Malgraŭ siaj reŭmat-ismoj la prezidanto de la Akademio galopis al la reĝa palaco.

-- Via reĝa moŝto vokis min.

-- Jes, sinjoro prezidanto. Bonvolu sid-iĝi kaj diri al mi, kiel vi skribas la vorton "reĝo".

Balbut-ante, la Akademi-estro liter-umis

-- Ro - e - ĝo - o.

-- Kio estas super la tria litero?

-- Super la tria litero estas

super-signo, via reĝa moŝto.

La regn-estro rikanis.

-- Supersigno! Kiu inventis tiujn supersignojn?

-- D-ro Zamenhof, via reĝa moŝto.

-- Ĉu vi ne opinias, ke D-ro Zamenhof iel neglektis la hierarkion?

La prezidanto de la Akademio mal-fermis la buŝon kaj rigardis sian suverenon per mir-rondaj okuloj. La reĝo ek-kriis

-- Mal-benita estu la

Fundamento, kiu donis al reĝo simplan ĉapelon anstataŭ krono! Ĉu vi aŭdas, sinjoro prezidanto?

Mi postulas mian kronon.

Bonvolu do trans-doni al ĉiuj pres-istoj de mia lando jenajn ordonojn

1e De nun, oni skribu la vorton "reĝo", uzante kronon anstataŭ simpla supersigno.

2e Oni uzu do kronojn por la titolo "reĝa moŝto".

3e Oni uzu iom pli malgrandan kronon por la vorto "reĝino".

La prezidanto de la Akademio riverencis tri fojojn kaj el-iris el la palaco. Ne domaĝ-ante siajn reŭmatismojn, li vizitis ĉiujn presistojn de la regno, por konigi al ili la reĝan dekretan.

Oni devis kompren-eble fandi novajn tipojn, sed ĉiuj kort-eganoj akord-iĝis, por laŭdi la bon-guston de la reĝo kaj trovi la novajn librojn du-oble interesaj.

Kiam oni lanĉas modon, multaj homoj volas imiti ĝin. Subite, krom pulĉinelo, kiu opiniis sian

La milito de la ĉapeloj

konusan ĉapelon belega, neniŭ estis kontenta pri sia supersigno Volis

la ĝarden-isto pajlan ĉapelon,
la ŝip-isto mar-ist-an ĉapon,
la ĵurnal-isto kvadrat-itan kaskedon,

la ĉambr-ist-ino puntan kufon,
la ĝendarmo milit-istan kepon,
la ĉampano* korkon,
la ĝemelo du supersignojn,
la ĵongl-isto tri aŭ kvar...

La libroj ĉiam pli bel-iĝis, sed la laboro de la kompat-indaj presistoj far-iĝis tiel komplika, ke pluraj preferis ŝanĝi la metion, antaŭ ol frenez-iĝi.

La prezidanto de la Akademio deklaris, ke li rezignos sian oficon, se oni plu tedos lin per tia bagatelo. Oni memoru, ke tiu kroma labor-ado perd-igis al li la lastajn tri harojn, kiuj konsist-igis lian propran kap-ornam-aĵon.

Ve, la unua-vidu nur supraĵa tumulto degeneris en klas-batalon kaj eĉ en inter-civitanan militon, kiun la histori-istoj nomis "la milito de la ĉapeloj".

En ĉiuj pres-ejoj de la lando la 22 mal-riĉaj literoj rifuzis kun-labori kun la 5 riĉaj ĉapel-itaj literoj. Ili strikis kaj manifestaciis sur-strate kontraŭ la arogant-eco de la burĝaj literoj. Ĉi tiuj rimark-igis, ke ili ne kulpas pri sia nobela denask-it-eco, kaj ke ili estas nemal-hav-ebraj por la bona funkcio de la socio. Sufiĉas ja rigardi la ruĝajn aŭŝojn de la ribel-uloj "Abocoj el ĉiuj landoj, unu-iĝu!"

Oni devas vole ne-vole uzi supersignojn. Mal-dekstraj intelekt-uloj provis pruvi, ke oni povas verki proletajn skrib-aĵ-ojn sen supersignoj, kaj la ruĝaj aŭŝoj poste tekstis "Abocoj el la tuta mondo, unu-igu viajn fortojn!".

La aŭtoroj de detektivaj romanoj kaj la gazet-istoj protestis, ke oni ne rajtas trudi al ili tian ĵongladon. La intelekta vivo stagnis, sed neniŭ tendaro volis cedi. La situacio difekt-iĝis ĉiu-tage iom pli. Okazis, kio devis okazi, terura batalo. De sur la plej alta branĉo de mia poplo mi observis per lorno la mov-adojn de la korpusoj en la eben-aĵo. Pezaj paf-aĵoj hajlis el la linio de la nombre superaj sen-ĉapel-uloj "fi-uloj - banditoj - krud-uloj - abomen-uloj - murd-istoj!". La atak-itoj rezistis, firme tenante super si siajn supersignojn kvazaŭ militistajn kaskojn. Kiam ili kontraŭ-atakis, sangajn vundojn kaŭzis al la simpl-uloj la akraj sago-pintoj de la cirkum-fleks-itaj insultoj "aĉ-fuŝ-uloj - sovaĝ-uloj - aĉ-uloj - apaĉoj!".

La sorto de la batalo restis nedecid-ita. Vespere la presistoj devis bandaĝi kontuzojn, tuberojn kaj rompojn de multaj difekt-itaj literoj.

Por venki tiun ribelon, la reĝo ordonis dungi fremdajn literojn el Francio, Ĉeĥoslovakio kaj aliaj barbaraj landoj posedantaj strangajn, minac-aspektajn

La milito de la ĉapeloj

literojn.

Aŭd-inte tion, la prezidanto de la Akademio kun-ven-igis la hieraŭajn mal-amikojn kaj per kor-tuŝaj paroloj pet-egis ilin forgesi sian sterilan kverelon kaj solidar-iĝi kontraŭ la invad-antoj .

Karaj alfabet-anoj, vi formas unu grandan rondon familian, en kiu ne estas riĉaj kaj mal-riĉaj, belaj kaj mal-belaj literoj, sed nur egalaj kun-uloj. Gravas ĉiu el vi, kun aŭ sen ĉapelo. Supersignoj ja ne estas frivola galanterio, kiel volis kred-igi al ni la reĝo, sed iloj nepre necesaj por la internacia kompren-iĝo.

Tondra aplaŭdo sub-strekis tiujn ardaĵajn vortojn. La literoj lo, i, bo, e, ro kaj a kriis

-- For la tirano!

Ĉiuj kun-kriis

-- For! Vivu la demokratio!

La saman tagon la reĝo fuĝis ekster-landen kun sia luksa supersigno sub la brako. La prezidanto de la Akademio fariĝis prezidento de la respubliko, kaj de tiam la literoj de la Esperanta aboco sen-ĉese kun-verkas bel-eg-ajn tekstojn, antaŭ kiuj la tuta mondo respekte kaj admire de-metas la ĉapelon.

Louis Beaucaire

(el Fabeloj de la verda pigo, Antverpeno-La Laguna: TK/Stafeto, 1981, pĝ. 9-13)


* ĉambelano: kamerheer.

* cambelano: dit is een woord zonder betekenis, precies omdat het hoedje (vrijwillig!) weggelaten is.

* ĉampano: champagne (drank)

Met dank aan Leo De Cooman

Reklamo



La manlibro pri Vikipedio estas aĉetebla en la retbutiko de FEL por €3.

www.retbutiko.net

Ĉiu partoprenonto de la PSKK ricevos ĝin senpage!

Ekspozicio de E-bildkartoj

Post plurmonata kolekta kaj prepara laboro, antaŭ 4 jaroj, en 2003 ni malfermis la virtualan ekspozicion de Esperantaj bildkartoj ĉe la retejo de la budapeŝta E-Centro "Eventoj".

Tiam, ĉe la malfermo, la bildkartokolekto havis 768 pecojn. Danke al internacia helpo, danke al la alsendo de mankantaj kartoj (58 personoj el 22 landoj + UEA), nun la kolekto havas 1439 kartojn, kiu multe-multe superas ĉiujn antaŭajn, anticipajn atendojn, imagojn.



Dum la 4 jaroj de la funkciado multe ŝanĝiĝis, evoluis ĉe interreto. Kiel rezulto de plurmonata intensa laboro, ekde 20-a de aŭgusto 2007 bildkartoj de la virtuala ekspozicio aperas en renovigita formo kun pli granda dimensio kaj pli bona bildokvalito.

Nun estas videblaj 1439 Esperantaj bildkartoj el 46 landoj, sed estas ankaŭ 67 kartoj, kies deven-lando ne estas konata.

Ni estus dankaj, se vi povus helpi klarigi tiujn nekonatajn kartojn. Se vi alsendas Esperantan bildkarton, ne videblan ĝis nun en la ekspozicio, volonte ni aldonos ankaŭ vian nomon al la listo de subtenantoj-kunkolektantoj.

Adreso de la ekspozicio:

www.eventoj.hu

Bonvenon!

Informas: Szilvási László

De la 2a ĝis la 9a de aprilo 2007 okazis la ĉi-jara (jam 23-a) PSI (Printempa Semajno Internacia) en la tre agrabla feriejo "Haus Venusberg" (Bonn, Germanio). Estis mia dua PSI kaj hazarde ankaŭ mia dua fojo en tiu sama, tute plaĉa ejo. Do jen mi komencis mian raporton per la kutimaj donitaĵoj... mi promesas fini ĝin per malpli kutimaj...

Tamen, unue mi gratulu la organizantojn pro la sukcesa kunigo de 163 homoj el 22 landoj, inter kiuj eĉ samideanoj el Nepalo kaj Brazilo, kiuj alportis vere ekzotan aspekton al la aranĝo! PSI estis, kiel kutime, organizita DE familioj POR familioj: haveblis kaj programeroj por la infanoj kaj por la plenkreskuloj - kaj kompreneble la nemalhavebla knajpo! (1) Ĉeestis ankaŭ sufiĉe multe da junuloj - parte dank' al la plurtaga 'SUB-18'-kunveno de GEJ (Germana Esperanto-Junularo) sine de PSI - kvankam bedaŭrinde la germanaj junuloj kunsidis ĉiam malantaŭ fermita pordo kaj apenau integriĝis inter la aliaj partoprenantoj. Tamen, estis entute modela aranĝo kompare al multaj aliaj, kiuj ofte celas (aŭ atingas) nur unusaman aĝogrupon.

Menciindaj estis cetere la prelegoj de Claude Piron, la magia prezento de Christoph Frank kaj la koncerto (Boogie-woogie-muziko) de la konata Frank-Muschalle-

trio (ruze malfermita ankaŭ al ne-esperantistoj).

Kaj nun la malpli kutimaj novaĵoj: autentata fantomo hantis la partoprenantojn en bele elpensita ludo kiu estigis konversaciojn kiaj "La kioman fojon vi ĉeestas al PSI?" - "Miaj piedoj estas tro grandaj!" Tamen ne okazis Kazohinia(2) freneziĝo! Jen la klarigo: la organizantoj donis poiome etan indicon pri la identeco de la fantomo, inter kiuj la ŝugrandeco kaj la nombro de ties PSI-ĉeestoj...

Due, la organizantoj tre afable pretis gastigi flandran reĝisoron kiu faris kiel audicio testfilmetojn de volontulaj partoprenantoj, prepare al serioza, originala longfilmprojekto. Cetere venis ankaŭ ĵurnalistoj kaj filmskipo por la loka televido, kiu dediĉis plurajn minutojn al la Esperanto-renkontiĝo kaj aperis artikoleto en pluraj (retaj) ĵurnaloj.

Laste - kvankam tio verŝajne ne menciindas en raporto - fraŭlino sukcesis frakasi la vitregon de la solida antaŭpordo de la ejo per nur sia nazo... sed feliĉe apenaŭ vundiĝis!

Lode

(1) Knajpo = tipa germana trinkejo.
(2) Referenco al ĉefverko el la Esperanto-literaturo, "Vojaĝo al Kazohinio" de Sándor Szathmári.

Renkontiĝo PSKK—dua informilo



PSKK estas la aŭtuna renkontiĝo de FLEJA. Je la PostSomera Klaĉkunveno oni interalie postĝuas la somerajn aranĝojn kaj antaŭĝojas la vintrajn. Estas interŝanĝo de fotoj, oni rakontas, prelegas, ktp.

Tradiciaj programeroj dum la ĉiujara renkontiĝo estas la danc-kurso de Bart Demeyere kaj Heidi Goes kaj la gvidata vizito al la urbo aŭ komunumo kie okazas PSKK.

PSKK 2007 okazos en De Wiekslag en Heesstraat, 3545 HALEN (Zelem) de la 31-a de oktobro (ekde la 18h) ĝis la 4-a de novembro (16h).

Ĉar la ejo estas malfacile atingebla per publika transporto, ni organizos taksiservon. Por nur po €1 persone ni transportos vin de la stacidomo de HASSELT al la ejo. Sciigu vian alvenhoron al nia sekretario Yannick antaŭ la 28-a de oktobro (0486/429577).



Renkontiĝo PSKK—dua informilo

Gravaj informoj

Vi devas mem kunporti litotukon por kovri la matracon, dormosakon kaj kovrilon por la kapkuseno.

Partatempaj partoprenontoj bv. sciigi al Yannick dum kiuj tagoj ili ĉeestos PSKK. Gravas por la asekuo. Ni organizos Halloweenfeston kaj ornamos la ejon. Okazos elekto de la plej bele vestita persono. Kunportu do la necesajn vestaĵojn, ŝminkon ktp.

La Flandra Esperanto-Ligo denove prizorgos la libroservon de PSKK. Antaŭmenu viajn librojn ĉe Gerd per retmesaĝo al financoj@fel.esperanto.be.

Por eviti krompagon de €10, bv. antaŭpagi antaŭ la 24-a de oktobro. Surloke tuj post alveno enordigu vian kotizon kun nia kasisto Matthias (0496/604087).

Porprogresanta kurso de profesia kaj entuziasmiga instruistino

La LKK de PSKK ĝojas anonci ke dum la baldaŭa PSKK okazos porprogresanta kurso gvidata de la hungara lingvistino Katalin KOVÁTS. Ŝi ankaŭ prelegos pri lernokonsiloj kaj pri sia retejo www.edukado.net.

Katalin Kováts profesie okupiĝas pri instruado de Esperanto. En sia doktora disertacio ŝi analizis la propedeŭtikan valoron de

Esperanto. Krom doni teoriajn lekcionojn, ŝi ankaŭ trejnas lingvoinstruistojn pri metodologio, kies spertojn ŝi aktive uzas en la plibonigo de Esperanto-instruado. Ŝi gvidis multajn Esperanto-kursojn kaj metodikajn seminariojn dise en la mondo (antaŭe kiel Katalin Smidéliusz), kaj de multaj jaroj estas membro de la Internacia Ekzamena Komisiono.

Antaŭnelonge Katalin kompilis la libreton *La Komuna Eŭropa Referenckadro*. Pri instruaj kaj taksaj metodoj por la akiro de modernaj lingvoj, eldonitan de UEA/ILEI. La kernon de tiu libreto konsistigas la esperantlingva traduko de la unua ĉapitro de la plurcentpaĝa libro eldonita de la Konsilio de Eŭropo kaj konsiderata la plej baza kaj grava dokumento en la eŭropa lingvoinstrua medio. Kiel eŭropa fakulo ŝi partoprenis en la ellaborado de la Esperanto-taksosistemo por usonanoj.

Do nepre ne maltrafu la ŝancon partopreni kurson de ĉi tiu ege profesia, kaj cetere tre entuziasmiga instruistino! La kurso estos aktiva kaj paroliga, kaj temos pri gramatiko kaj vortotrezoro. La lecionoj daŭros po tri horojn kaj okazos ĵaŭde posttagmeze (14a-17a), kaj vendrede matene (9a30-12a30). Ĵaŭde vespere Katalin prelegos pri utilaj, konsilindaj lerniloj, kaj

Renkontiĝo PSKK—dua informilo

pri sia retejo www.edukado.net. figurojn!

La aŭskultantaro povos ekkoni la celojn kaj funkciojn de la paĝaro, kaj ties valoron por instruistoj kaj lernantoj. Videblas specimenoj de la sekcioj, kaj Katalin rakontos pri la laboro kiun ŝi jam dum pli ol kvin jaroj faris malantaŭ la kulisoj.

Atentu: PSKK-partoprenontoj kiuj ŝatus partopreni la dulecionan kurson de Katalin devas anonci sin antaŭ la 20a de oktobro. Ĉi tio necesas ĉar ni devas antaŭe scii kiom da partoprenantoj estos, por ke ni faru ĝustan kvanton da kopioj ktp. Ne atendu ĝis la lasta momento por anonci vin, ĉar la nombro de partoprenantoj estas limigita je 20. Do anoncu vin kiel eble plej baldaŭ ĉe la programkunordiganto Heidi Goes (prefere retmesaĝe je Heidi.Goes@gmail.com, aŭ telefone 050/675178 post oficejaj horoj). Por la prelegoj ne estas limigoj, kaj ne necesas anonci sin.

Magia vojaĝo tra la mondo kun Christoph Frank

La korpe kaj kore infanaj partoprenontoj de PSKK povas jam antaŭĝoji ĉar venos Christoph Frank, profesia pupludanto. La temo de la teatraĵo estas 'magia vojaĝo tra la mondo', kaj la infanoj povas ne nur aktoriĝi, sed ankaŭ prepari la

Infanoj atentu: se vi partoprenas PSKK-on (ne forgesu aliĝi!) kaj volas ludi en la teatraĵo de Christoph, anoncu vin antaŭe ĉe li, prefere antaŭ la unua de oktobro. Eblas fari tion rete: Zauberbuehne@t-online.de. Se vi aŭ viaj gepatroj ne povas retumi, eblas telefoni al Heidi (050/675178), kiu plusendos la informojn. Christoph kontaktos vin por interkonsenti la rolojn, tiel ke vi povas jam lerni la tekstojn antaŭ PSKK, ĉar la tempo dum PSKK ne sufiĉos.



Pliaj informoj pri PSKK

Provizoran programon, aliĝilon kaj aliĝintojn, fotoraporton de PSKK 2006, informojn pri kotizokategorioj, repagoj kaj krompagoj vi trovos en la retejo

www.esperanto.be/PSKK

Heidi kaj Yves

Etymologie—namen van weekdays

maandag / lundo: een vertaling van het Latijnse dies lunae ('dag van de maan').

dinsdag / mardo: waarschijnlijk genoemd naar een verder onbekende, Germaanse god Thingsus, de god van de volksvergadering. Een andere mogelijkheid is een verband met ding in de betekenis 'vastgestelde tijd voor de rechtszitting'. Mogelijk werd er in vroeger tijden op dinsdag rechtgesproken. In het Latijn heette de dinsdag dies Martis: de dag van Mars, de oorlogsgod.

woensdag / merkredo: genoemd naar Wodan, de Germaanse oppergod. Bij de Romeinen was woensdag de dies Mercurii: de dag van Mercurius, de god van de handel en winst.

donderdag / jaũdo: genoemd naar de Germaanse god Donar (Thor), de god van de donder. Donar werd vereenzelvigd met de Romeinse god van het onweer, Jupiter. Vandaar ook dat de dies Iovis ('de dag van Jupiter') door de Germanen naar Donar werd vernoemd.

vrijdag / vendredo: genoemd naar Freya, de Germaanse godin van de vruchtbaarheid, de liefde en de wellust. Haar Romeinse tegenhanger was Venus, naar wie deze dag bij de Romeinen vernoemd was (dies Veneris).

zaterdag / sabato: een vertaling van het Latijnse dies Saturni: dag van Saturnus, de god van de landbouw. 'Zater' is een verbastering van Saturnus.

Zondag / dimanço: een vertaling van het Latijnse dies solis ('dag van de zon').

Bron: <http://www.onzetaal.nl/>

De etymologie van de namen van maanden vindt u op <http://www.onzetaal.nl/advies/maanden.php> Er is nog plaats voor ééntje...

januari / januaro: naar Janus, de god van doorgangen, poorten en in- en uitgangen, ook in de tijd. Algemeener werd Janus wel gezien als god van alle begin, en van de overgang van oud naar nieuw. Janus wordt meestal afgebeeld met twee gezichten: een dat naar voren kijkt (naar de toekomst) en een dat naar achteren kijkt (naar het verleden). De elfde maand van het jaar werd naar hem vernoemd omdat hij als het begin van een nieuwe periode werd beschouwd – het was namelijk de eerste maand na de winterse zonnewende. Dat deze maand uiteindelijk de eerste maand van het jaar werd, heeft ook met die associatie te maken.

Activiteitenkalender najaar 2007

OKTOBRO

31/10 ĝis 04/11 | **Halen (Belgio)** | PSKK!
Pli da informoj vi trovos en tiu ĉi JEN.

NOVEMBRO

9/11 ĝis 11/11 Sub-18 | **Heidelberg**
(Germanio) | <http://www.esperanto.de/kej/>



24-a de novembro | **Roterdamo** | Malferma tago de UEA

DECEMBRO

27/12 ĝis 02/01 | **Malbork (Pollando)** | Ago-Semajno



Pollando 27.12.2007 - 2.01.2008

27/12 ĝis 03/01 | **Würzburg (Germanio)** | Internacia Seminario

27/12 ĝis 03/01 | **Föckinghausen (Germanio)** | Novjara
Renkontiĝo

Deze kalender is een selectie! Meer info over bijeenkomsten vind je onder andere in de kalenders van het Hongaarse Eventoj www.eventoj.hu/, en deze van NEJ www.esperanto-jongeren.nl/aktiviteiten.php.
Neem zeker ook eens een kijkje op www.mondakalendaro.org !